

Stranga Ilustrita Vortaro de Esperanto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 467, 1981.04.02 & 04

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Unu el la bibliografiaj kuriozaĵoj en la vortara literaturo esperantlingva, eatas la Ilustrita Vortaro de Esperanto de Francisko Azorin, kies unua volumo aperis en Meksiko en 1955. Ĝi ne vendiĝis pro sia fuŝeco, kaj neniam aperis la anoncita dua volumo,

A.- Esperanto havis la privilegion vidi sian kreskantan leksikon registrita fare de ne nur kompetentaj, sed ankaŭ talentaj vortaristoj. Jam Zamenhof verkis kun granda inteligento la unuajn vortarojn de la lingvo. Lia **Universala Vortaro de la Lingvo Internacia**, en ses lingvoj, aperinta ĉe Kelter, Varsovio en 1894 eniris senŝanĝe la kolekton, kiu ricevis en 1905 la titolon **Fundamento de Esperanto**. La **Vortaro de Esperanto** de Kabe, aperinta en 1910 per la simpleco kaj klareco de siaj difinoj kaj ekzemploj fariĝis modela verko, kiu influis la postajn vortaristojn, kies ĉefaj nomoj estas **Bastien**, al kiu ni interalie ŝuldas la **Naŭlingva Etimologia Leksikono**-n, 1907, **Wüster**, kies **Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana** neniam finverkiĝis, la unua kajero aperis en 1923. Al **Grosjean-Maupin** ni ŝuldas la novan fundamenton de Esperanto, la **Plena Vortaro de Esperanto** de 1930, kaj al Waringhien apartenis la rolo redakti la **Suplementon** de 1954 al tiu baza verko. Kaj ni havis la okazon plurfoje laŭdi lian ĉefverkon, la **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** de 1970.

Cl.- Konsultante tiujn ĉi vortarojn, kaj la esperanto-nacilingvajn verskojn, kiujn ili inspiris, ni trovas tute normala ilian fidindecon. Tamen, kiam oni ekzamenas la vortarojn en la aliaj planlingvoj, oni ofte miras pro iliaj gravaj mankoj. Interlingvistoj serĉantaj en la volapükaj vortaroj de **Schleyer** kaj **Kerkhoffs** la ekzaktan signifon de volapükaj kunmetaĵoj rapide konvinkiĝas, ke la esperantistoj estas privilegiitoj. **Zamenhof** haltis kun saĝo en la diserigo de la vortoj, rezignante eĉ diserigi la korelativojn. Li kapablis sekvi mezvojon inter skemismo kaj naturalismo, rezignante konsideri kiel registrindajn unuojn la grek-latinajn afiksaron, kies rolo estas ege kompleksa kaj plursignifa, kaj la plimulto de la esperanto-vortaristoj fidelis al tiu ĉi saĝa sinteno.

A.- **Francisko Azorin** havis tute alian vortaristan sintenon. Li provis pli fajne malkonstrui la vortojn, volante obeigi Esperanton al vortkonstruaj reguloj neniel kongruaj kun la lingvo-uzo, kiun devas speguli vortaro. En lia vortaro, ekzemple, la esperanta **aŭtomobilo** fariĝis **aŭto-mov-ilo**, kio kondukis al la ĉi-sekva difino: « Aŭto-mov-ilo. Movilo, kiĵ movas sin mem; senĉevala veturilo movata de propra motoro, elpensita en 1869. Movilo skribiĝas esperante per V, sekve aŭtomovilo... kaj aŭto-mov-il-isto, kiu kondukas aŭtomovilon.

Cl.- Oni povas kompreni, per tiu nura ekzemplo, «ke la **Ilustrita Vortaro de Esperanto** de Francisko Azorin neniel konvinkis la esperantistaron al aĉetado kaj konsultado. Kaj la antaŭmendintoj, kiam ili ricevis la libregon, sin tuj demandis, ĉu Azorin ne estis humoristo. Aŭdu kelkajn vort-dividojn kaj klarigojn, kaj vi tuj komprenos, ke ili estas neniel konvinkigaj;

A.- La vorton **kanono** vi trovas en ia rubriko **kano**. Kaj **kanono** estas registrita kiel **ono da kano**, aŭdu:

Cl.- **Kan-ono**. Pafilego kun ono da kano, la tuboformo.

A.- Same **kanalo** apartenas al tiu rubriko **kano**:

Cl.- **Kan-alo**. Io al kano rilata pro la formo, tiel la organaj tuboj, la akvokondukejoj.

A.- **Citrono** aperas en la vortaro de Azorin kiel ono da citro. Aŭdu:

Cl.- **Citro**. Korda muzikilo, elpensita de Terpandro, simila al harpeto; speco de liro. Frukto simila al la citrono, sed pli granda. **Citr-ono**. Frukto, kiel ono da citro, plimalgranda, pli acida kaj akra.

A.- Azorin provas doni al la sufikso **ono** la nuancon de malgrandigo, kaj ne nur de parto.

Cl.- Citrono laŭ Azorin estas ono da citro, tio estas malgranda citro, kaj pro tio citro aŭtomate estas granda citrono, kaj ne nur nuzik-instrumento.

A.- Tiu citr-ono, kiu estas pli akra ol citro, kondukas nin al la rubrikco **akra**, en kiu oni trovas **akro-bat-i**, **akro-bat-aĵo**, kaj eĉ **akr-ido**. Vi aŭdu:

Cl.- **Akra**. Akuta, pika, tranĉa rande. Severege malmilda. Impresanta forte kaj dolore la sentumojn. Sagaca, subtila, penetranta. Pinta, akuta.

A.- **Akro-bat-i**. Ektuŝegi gimnastikilojn akre, per rapida, impresanta movo; ŝnurdanci.

Cl.- **Akr-ido**. Saltinsekto, ido akra de la naturo.

A.- Konvinkigaj difinoj, ĉu ne?

Cl.- En la vortaro de Azorin, la adjektivon **aliena**, kiu signifas **demenca**, ni devas serĉi en la rubriko **alia**. Laŭ Azorin ĝi tiel formiĝas:

A.- Unue oni havas la difinon de **alia**. Latinismo uzata kiel adjektivo por la signifo diferenca, malsama; dua, rilate al personoj aŭ grupoj. Kiel pronomo, alia signifas iu plia.

Cl.- Poste oni iru al la adverbo **alia**. **Ali-e**. Adverbo signifanta: alimaniere. aliokaze, en kontraŭa okazo. por iuj, aliloke.

A.- Kaj nun ni iru al la vorto **alien**. **Ali-en**. Akuzativa formo de alie, signifanta en alian lokon, en alian okazon.

Cl.- Kaj nun ni alvenu al nia frenezulo. **Ali-en-ato**. Persono devenanta, ŝanĝiĝinta en alia maniero, mense anormala, freneza: frenezulo.

A.- **Ali-en-iĝi**. Freneziĝi, fariĝi en alian manieron mense.

Cl.- El tio ali-en-ejo. Frenezulejo. Ali-en-aĵo. Frenezaĵo, ktp...

A.- Komika alienaĵo de Azorin troviĝas en la rubriko babilo, el kiu li derivas Babilono, kiel babil-ono, kiel babil-ono. Babilona estas tiel difinita: Havanta onon da babilismo. Kaj babilismo: sistemo babiladi konfuze, diverslingve, aŭ unulingve por amuzi publikon.

Cl.- Ke Francisko Azorin tute serioze povis fari tiajn vort-malmuntojn kaj ali-en-igajn babilaĵojn pravas, ke ne ĉiuj vortaristoj samopinias pri sia tasko. Azorin, laŭ sia maniero pravis, kiel li skribis en la antaŭparolo al sia vortaro, zorge atenti la rekomendon de la dua

parto de la 15-a regiulo de la Plena Gramatiko zamenhofa: "ĉe diversaj vortoj de unu radiko eatas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamantan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta, laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

A.- La rezulto estas humurplena, ĉar ni posedas aliajn vortarojn, je kiuj ni povas plene fidi. Sed imagu, ke nur tiun vortaron de Azorin ni posedus. Tia estis la sorto en aliaj planlingvoj. Oni komprenas, ke ili ne povis normale disvolviĝi.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras ai vi, ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*